WIKIPEDIA

Ruanda lingvo

La **ruanda lingvo** (nacilingve *kinyarwanda* aŭ *rwanda*; kodoj laŭ ISO 639: kin, rw) estas bantua lingvo parolata en Ruando kaj en limaj regionoj de la Demokratia Respubliko Kongo, Ugando kaj Tanzanio kun proksimume 9 milionoj da parolantoj. Ĝi estas etna lingvo de la Hutuoj, Tucioj, Mulenganoj (*Banjamulengoj*) kaj Tvaoj. La ruanda lingvo estas apud la angla kaj la franca oficiala lingvo en Ruando. Komence de la 20-a jarcento okazis skribitigo de la lingvo surbaze de la latina alfabeto.

Ĝi tre similas al la burunda, kun kiu ĝi estas interkomprenebla.

ruanda	
Kinyarwandi	
Parolata en	Barato
Parolantoj	9 800 000
Denaskaj parolantoj	20 milionoj
Skribo	Latina skribo
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	rw
ISO 639-2	kin
ISO 639-3	kin
SIL	KIN (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=kin)
Glottolog	kiny1244
Angla nomo	Kinyarwanda
Franca nomo	kinyarwanda
Vikipedio	

Vortprovizo

Amahoro = paco

Amakuru = *Kio nova? / Kiel vi fartas?*

Amakuru ni meza = *Mi fartas bone / Ni ambaŭ fartas bone*

Muraho = *Bonan tagon*

Wiriwe = *Bonan tagon (ekde la 11:00 h)*

Ndagukunda = *Mi amas vin.*

Maurakoze = *Danke*

vuba = *rapide*

Bite = *Kiel vi fartas?*

kuririmba = *kanti*

kurya = *manĝi*

icyayi = *teo*

umugabo = *viro*

umugore = *virino*

umwana = *infano*

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Eksteraj ligiloj

- http://www.unicef.org/french/infobycountry/rwanda_statistics.html
- http://www.survie-alsace.org/Afrique/Burundi/gatumba.htm
- http://www.bbc.co.uk/greatlakes
- http://www.rwanda-forum.new.fr

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Ruanda_lingvo&oldid=6115091"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 14:35, 1 mar. 2017.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.